





# tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo  
*Časopis Hrvatskog saveza za esperanto*

Junio 2026 / n-ro **147**



-  La 14a kongreso de kroataj esperantistoj en Karlovac
-  Aŭstra komisiono pri UNESCO protektis Esperanton en Aŭstrio
-  Vizito de la familio de Stanislav Tomić el Kolumbio
-  Granda perdo! Mortis Probal Daŝgupta; Mortis Ivo Osibov

Kio estas la plej grava novaĵo pri Esperanto el 2026?

En la januara Nokto de la muzeo Kroata Esperanto-Ligo malfermis siajn ejojn kaj venis vizite 26 personoj por konatiĝi kun nia historio. Ili aŭskulis pri la pioniroj de Esperanto en **Zagrebo**, precipe pri **Danica Bedeković** por kies strato ni administre luktas en **Varaždinske Toplice**. La publiko konatiĝis kun la riĉa vivo de **Tibor Sekelj** kaj fine spertis kio estas la *Zagreba Metodo* de Esperanto-instruado lanĉita de **Zlatko Tišljar**.

La plej grava novaĵo en 2026 venas el **Aŭstrio**. Tie Unesco-komisiono de Aŭstrio akceptis Esperanton en la nacian liston de protektataj nemateriaj trezoraĵoj. La fenomeno Esperanto estas akceptita fare de la UNESCO-komisiono de **Aŭstrio** kiel „Esperanto-Kulturo en Aŭstrio“. La decidintoj aparte akcentis ke Esperanto ne estas nur komunikilo sed ankaŭ portanto de la kultura praktiko, kiu aktive vivas kaj kiu estas plue heredigata. En **Aŭstrio** la protektata fenomeno rajtas je speciala simbolo de UNESCO-komisiono kiu kombinas la simbolon de la portanto de la fenomeno kun la UNESCO-simbolo, kaj kiun kreas kaj aprobas Komisiono pri UNESCO de Aŭstrio.

Speciala diplomo pri la agnosko de Esperanto en **Aŭstrio** estos ricevota dum Universala Kongreso de Esperanto en **Graz** en aŭgusto. En **Aŭstrio** oni publike festas novan deklaron kaj unu fojon jare kolektiĝas la reprezentantoj de la novelektitoj ĉe la komuna festo.

La procedon de kandidatigo ĝis la nomumo prizorgis la aŭstria Esperanto-funkciuloj **Ewald Schick** kaj **Martin Gritsch**.

Post **Pollando** kaj **Kroatio** jen ankaŭ **Aŭstrio** sukcesis protekti Esperanton! Kiu lando estas la kvara? Ne sukcesis **Svislando** nek **Hungario** nek **Slovakio** ĉar tio estas tre pena



laboro, kun ne ĉiam pozitiva rezulto.

Enlande gravis, ke la 28an de januaro vizitis Kroatan Esperanto-Ligon la oficistoj de Kroata Ŝtata Arkivo kaj transprenis ses “metrojn da bretoj” da nia arkivo, cg. 750 libroj, rilatantaj al la jaroj de 1909 ĝis 2025. Temis ĉefe pri la duoblaĵoj de niaj libroj kiujn kroataj esperantistoj kreis ne nur por la kroata kulturo sed ankaŭ kiel helpantoj en tradukado de slovena samkiel kulturo de **Bosnio** kaj **Hercegovino**. La laste eldonita libro kiun ni transdonis estas *Garbeno, la malbona vento* de **A. Borčić**. La teamo de Kroata Ŝtata Arkivo planas reveni en junio.

La teamo de la gazeto de *Jutarnji list* venis al ni por filmi nian membron **Veronica Alzate**, la prapranepino de la aŭtoro de la esperanta gramatiko „Esperanto u 33. lekcije“. Tiun ekzempleron de la lernilo posedis **Paul Kastner**. Ĵurnalistoj esploris la arkivon pri Paul Kastner, posedata de KEL, ekz. poŝtkarto el Parizo per kiu oni respondas al Kastner pri la mendo de la Esperanto-gazetoj en 1915. Paul Kastner estis interesa al ĵurnalistoj ĉar ĉi-printempe oni vendis la vardomon Na-Ma kiu iam estis la vardomo Kastner

und Öhler, posedata de la familio Kastner.

La gepatroj de **Veronica Matilde Saldarriaga Tomić** kaj **John Alzate Molina** el **Kolumbio** mem vizitis Kroatan Esperanto-Ligon en aprilo.

Kroata Fervoja Esperanto-Asocio donis siajn materialojn al Kroata Ŝtata Arkivo en marto.

*Informilo de Rijeka* aperis kun gravaj por la rijekaj esperantistoj en la tempo inter aprilo kaj decembro 2025. Redaktis ĝin **Ana Alebić-Juretić**.

La prezidanto de Esperanto Societo Rijeka **Emil Hrvatin** mendis dekon da Esperanto-ĉemizoj por esperantistoj en **Rijeka**.

**Mea Bombardelli** en Esperanto-Klubo „Tibor Sekelj“ pri *La bela subtera mondo* la 8an de aprilo 2026. En januaro la sama preleganto prelegis pri la temo *Kio estas matematiko?* Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“ havis sian jarkunvenon en januaro.

*La celpoŝto Osijek/ Zadnja poŝta Osijek* estas la libro de la kroata verkisto **Nenad Rizvanović** kiu inspiriĝas pri la urbo **Osijek**. En la libro, kiun la verkisto prezentis al ni, en la fokuso estas la parta biografio de la jugoslavia esperantisto **Lavoslav Kraus**, precipe liaj militaj jaroj post 1914. La interparolojn kun la verkisto en Esperanto-Societo *Tibor Sekelj* gvidis **Spomenka Ŝtimec** la 13an de majo 2026. Montriĝis ke la aŭtoro Rizvanović ne nur okupiĝas pri esperantisto en sia verko, sed ankaŭ parencas al la aktuala prezidanto de Esperanto-Ligo de **Bosnio** kaj **Hercegovino** **Šefik Rizvanović!** Prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo **Anto Mlinar** renkontis **Lavoslav**

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Ĝis la jaro 2017 aperis papere kaj voĉe sur kompaktdiskoj. Jaro XLVII (47), numero 147 (1/2026) ISN 2991-194X. Sona numero 65/2026.

*Tempo* aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj en Zagrebo ekde 2004 kaj de 2022 ĉe la Biblioteko por blindaj kaj malbonvidantaj personoj en Zagreb. Voĉlegas Spomenka Ŝtimec.

La reta versio de Tempo ĉe: [www.esperanto.hr/tempo\\_kel.htm](http://www.esperanto.hr/tempo_kel.htm)

**Tempo** estas eldonita per la financa kontribuo de Ministerio pri kulturo kaj amaskomunikiloj.

**Redakcio / Uredništvo; Eldonisto / Nakladnik:** Hrvatski savez za esperanto / Kroata Esperanto-Ligo, Vodnikova 9, HR10000 Zagreb, Kroatio, +385 (91) 4617550; [kel@esperanto.hr](mailto:kel@esperanto.hr), [www.esperanto.hr](http://www.esperanto.hr); IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

**Kontribuis:** Ana Alebić-Juretić, Patrick Allen, Filip Ivančić, Zora Heide, Irena Hindy, Alessandra Madella, Slavko Mihalić, Josip Pleadin, Branka Sacher, Srđan Sacher, Ivan Špoljarec, Olga Štajdohar-Paden, Spomenka Ŝtimec, Krunoslav Tišljar

**Redaktoris:** Spomenka Ŝtimec. **Grafika aranĝo:** Ivan Špoljarec.

*La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.*

*Sur la titolpaĝo: Anto Mlinar kaj Spomenka Ŝtimec (2026). Fotis Ivan Špoljarec*



**Kraus en Rijeka** dum la 18a kongreso de Jugoslaviaj esperantistoj en 1964, kiam **Anto** eniris esperantistan laborbrigadon. **Kraus** plej multe daŭre famas pro sia eta Esperanto-kroata vortaro 4000 vortoj, kiujn li kreis kun sia klubeja samideano **Dragutin Wranka** en **Osijek** en 1935. La du aŭtoroj venis de du tre diversaj politikaj vidpunktoj sed sukcese kunlaboris pri la Esperanta vortaro.

**Ana Alebić-Juretić** raportis pri siaj esperantaj spertoj en **Aŭstralio** kaj **Nov-Zelando**.

**Ankica Jagnjić** kun pluraj helpantoj organizas reformon de nia biblioteko, kiu ĝis 2025 nombris ĉ. 6000 libroj, kaj konsistis el pluraj kolektoj de niaj membroj. **Nikola Rašić** donacis al ni sian Esperantan bibliotekon el **Požega**.

Esperanto-Societo **Split** havis sian jaran ekskurson en aprilo.

Esperanto-Societo Rijeka produktis en marto plian klubejan Informilon kiu interalie informis pri la morto de iam tre aktiva membro **Adela Franić**.

Alproksimiĝas nia nacia kongreso en **Karlovac**, kie la 19an de junio 2026 okazos nia elekta jarkunveno. En ĝi finiĝos la mandato de la malnova estraro kaj okazos le elektoj de la nova estraro. Kandidato por la prezidanto estas **Ivan Špoljarec**, kandidatino por la sekretariino **Ankica Jagnjić**.

En nia fera ŝranko estas enmetitaj ĝis junio 872 verkoj en Esperanto aŭ ĝia traduko kiuj kreas la kernon de nia protektita biblioteko de kroata Esperanto-kulturo.

En julio pluraj el ni veturos al **Graz** al la 111a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026. La Kongreson riĉigos ankaŭ muzika ensemblo **Golob** el **Bjelovar** kiu partoprenos en la programo.

Dum ni volis fini tiun ĉi numeron de Tempo trafis nin la informo pri la mortoj: en **Kolkato** en Bharato en junio mortis granda esperanta intelektulo lingvisto **Probal Daśgupta**. En **Split** mortis nia fidela membro **Ivo Osibov**. Per iliaj foriroj la monda Esperantujo grave ŝrumpis, ni adiaŭas de ili sur nia paĝo de nekrologoj.

*Spomenka Štimec*



### Esperanto-Kulturo en Aŭstrio akceptita en la liston de nemateria heredaĵo de Aŭstrio

Post Pollando kaj Kroatio jen ankaŭ la austriaj esperantistoj sukcesis meti Esperanton en la nacian liston de protektita nemateria heredaĵo. Protektita estas „Kulturo de Esperanto en Aŭstrio“. Tiu bona novaĵo alvenis de Aŭstria UNESCO-Komisiono en aprilo 2026. Nun tri landoj realigis iuspecan protekton de Esperanto. Ĉu tio rajtigas lanĉi tutgloban protekton en la proksima estonteco?

En Aŭstrio UNESCO-komisiono rajtigas, lige al la rekono, la ricevon al speciala Logo, kiu adaptiĝas al la Logo de la ricevinto. Unu fojon jare la nacia UNESCO-komisiono organizas specialan feston por la novakceptitaj fenomenoj/artefaktoj. Spomenka Štimec estis konsilanto al la aŭstrijaj kolegoj ĉe la kandidatigo por la prestiĝa elstarigo.

Graz en Aŭstrio estas la ĉijara kongresurbo, gastiganta la 111an Universalan Kongreson de Esperanto, okazonta de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026. Deko da kroataj esperantistoj planas partoprenon aliĝante al 900 ĝisnunaj aliĝintoj.

Speciala gasto de la kongreso estas la aŭstra verkisto Clemens Johann Setz, kiu verkis tre apartan historion de la Esperanta literaturo en sia libro „Abeloj kaj la nevidebla“. Dum la malfermo de la 111a Universala Kongreso de Esperanto ĉeestos ankaŭ la sekretario de Aŭstra UNESCO-Komisiono kiu enmanigos al aŭstraj esperantistoj specialan diplomon okaze de la proklamo de protektado de Esperanto.

*S. Štimec*

*Graz. Fotis Ivan Špoljarec*



# Kongreso en Karlovac



## 14-a KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ EN KARLOVAC

Ekde la 19-a ĝis la 21-a de junio en **Karlovac** okazis la 14-a Kongreso de kroataj esperantistoj. La kongreso kolektis partoprenantojn el **Kroatio** kaj gastojn el **Hungario**, **Svedio**, **Germanio** kaj **Ukrainio**. La ĉefa organizanto de la kongreso estis Dokumenta Esperanto-Centro el **Đurđevac** kunlabore kun Kroata Esperanto-Ligo.

La ĉefa tago de la Kongreso estis sabato, la 20-a de junio. Sabate je la 10-a horo okazis la elekta jarkunveno de KEL en la turisma vidindaĵo de **Karlovac**, prezentanta multajn dolĉakvajn fiŝojn *Aquatica*. En la jarkunveno la ĝisnuna prezidanto **Anto Mlinar** kaj ĝisnuna sekretarianino **Spomenka Štimec** prezentis la agadon de KEL en la pasinta jaro, la planojn por la nuna kaj la venonta jaro kaj la financon de la organizaĵo. En la dua parto de la jarkunveno okazis voĉdonado kaj aprobo de la nova prezidanto, tri vicprezidantoj kaj novaj estraranoj de KEL. La nova prezidanto estas la unuanime elektita **Ivan Špoljarec** kaj sekretariino **Ankica Jagnjić**.

Ene de la sabata programo ankaŭ okazis prelego de la gastino el **Ukrainio** **Nina Danylyuk** pri **Vasilij Eroŝenko** kaj motivo de paco en lia verko. Aparte impresis la informo ke ne estas konata ĉu la muzeo pri **Vasilij Eroŝenko** en **Obuhovka** travivis la ĝisnunajn militajn operaciojn en la regiono, dum la rusa-ukraina milito. En la dua parto de la programo partoprenis **Zdravko Seleš**, poeto kaj esperantisto el **Đurđevac**. **Mihaela Cik**, cetere lia lernantino, prezentis lian novan poemaron *Spuroj / Tragovi* kaj membrinoj de Esperanto-Societo **Split** **Darija Budiša** kaj **Lidija Leskur** prezentis la novan dulingvan libron de **Danica Bartulović** kaj **Lidija Leskur** *Vjesnice ljubavi / Mesaĝistinoj de amo* kiun kuneldonis DEC **Đurđevac** kaj ES „Split“.

Je la 14-a horo ĉiuj kongresanoj kolektiĝis en la restoracio *Tiffany*, kie sekvis la komuna tagmanĝo kaj babilado en amika etoso. Dimanĉo kiel lasta tago de la kongreso estis dediĉita al ekskursoj.

Kongresanoj vizitis la kastelon **Dubovac**, veturis per turisma ŝipo **Zora** sur la rivero **Kupa**, vizitis la kastelon en **Ozalj** kaj trarigardis la akvarion en *Aquatica* en **Karlovac**. La postkongresan lundon ĉiuj interesiĝantoj ekveturis al la tria Adriatika feriado en **Prvić Luka**.

*Filip Ivančić*

*Jarkunsido de KEL en Karlovac (supre).  
Prelego de Nina Danylyuk, maldekstre Josip Pleadin.  
Fotis: Ivan Špoljarec.*



## DEC NE PLU ORGANIZOS KROATAJN KONGRESOJN

En la lastaj kelkaj jaroj **Josip Pleadin** kun sia Dokumenta Esperanto-Centro el **Đurđevac** organizis por la membroj de Kroata Esperanto-Ligo belajn kaj enhavoriĉajn naciajn kongresojn. Dum la 14a kongreso de kroataj esperantistoj en **Karlovac** li deklaris ke li ne plu organizos ilin. Tiel la planataj kongresoj en **Delnice** kaj **Vukovar** en la venontaj du jaroj ne okazos per lia organiza energio.

Ĉu iu alia emas transpreni la torĉon?

S.Š.

# La malnova estraro adiaŭas!

Nia prezidanto **Anto Mlinar** adiaŭas de ni post multaj jaroj da prezidantaj taskoj. Per la jarkunveno de la asembleo en **Karlovac** li ne plu kandidatigaĝas por la prezidanta posteno.

**Spomenka Ŝtimec** ankaŭ forlasas la postenon de la sekretariino de Kroata Esperanto-Ligo! Dankon al vi ĉiuj por la multjara kunlaboro.

Dum nia agado ni sukcesis aĉeti la belajn Esperanto-ejojn en Vodnikova 9, en **Zagrebo** Ĉiuj kreditaj ŝuldoj estis elpagitaj kaj la ejoj tute apartenas al KEL. En ĝi estas nia arkivo kaj nia biblioteko. Komence de la jaro 2026 **Mlinar** kaj **Ŝtimec** nombris la librojn. La biblioteko havas ĉ. 6000 ekz. En ĝi elstaris kelkaj librokolektoj, ekz, tiu de **Emilija Lapenna** kaj **Mirko Mamužić-Manner**, ĉiu konsistanta el ĉ. 800 libroj.

Al Kroata Ŝtata Arkivo ni transdonis ĉ. 750 librojn kaj dokumentojn, ĉefe duoblaĵoj de la kroataj verkoj kaj tiuj kiujn kreis kroatoj. Ĉ. 850 kroatajn librojn ni enfermis en la feran ŝrankon por gardi ilin.

Post la zagreba tertremo en 2020, ni riparigis la detruitajn kamentubojn de la domo Vodnikova 9.

La nova kandidato por la prezidanto de Kroata

Esperanto-Ligo estas **Ivan Ŝpoljarec**, nomita **Ŝtef**, naskita en **Vrbovec** en 1954. La sekretariajn taskojn transprenas **Ankica Jagnjić**.

**Ivan Ŝpoljarec** lernis Esperanton en **Vrbovec** ĉe la konata kroata poeto kaj tradukisto **Josip Velebit**. Aktiva en Studenta Esperanto-Klubo kaj ĝia prezidanto, membro de Drama grupo de SEK. Kunaŭtoro de la lernilo „*La Zagreba Metodo de Esperanto-Instruado*“. Membro de LKK dum Universala Kongreso de Esperanto 2001. Ĉefredaktoro de **Tempo** (1980-1989) kaj la grafika redaktoro (de 2012).

**Ankica Jagnjić** (1963) lernis Esperanton en **Rijeka** kaj perfektigis ĝin en Studenta Esperanto-Klubo. Profesie ŝi estas instruistino de matematiko kaj informadiko. Prezidantino de SEK en 1984.

**Ankica Jagnjić** ekde aprilo 2026 organizis helpantan teamon kaj reformis la arkivejon kaj bibliotekon de Kroata Esperanto-Ligo. Laŭ la nova koncepto, nia biblioteko ne plu konservas librokolektojn de niaj membroj: nun estas envicigitaj laŭ ABC, en kategorio de originalaĵoj kaj tradukoj.

Tiel ni ricevis pli da spaco... kaj montris malpli da respekto al donacintoj.

S. Ŝ.

## Nova estraro de Kroata Esperanto-Ligo

En Karlovac dum la Jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo estis elektita la nova estraro de KEL kun la mandato ekde la 20a de junio 2026 ĝis 2030.

Ivan Ŝpoljarec  
*prezidanto*

Ankica Jagnjić  
*sekretariino*

Spomenka Ŝtimec  
Mihaela Cik  
Grozdana Grubišić-Popović  
*vicprezidantinoj*

Ana Alebić-Juretić  
Siniša Dvornik  
Filip Ivančić  
Robert Milijaš  
Đivo Pulitika  
Ljerka Stilinović  
*estraranoj*



Ivan Ŝpoljarec - Ŝtef



Ankica Jagnjić

### KORAN DANKON

Nome da la novelektita estraro mi elkore dankas vin, la asembleanojn, pro la fido kiun vi montris al ni per ĉi tiu elekto. Estas granda honoro sed ankaŭ respondeco akcepti la estraranecon. Ni laboros sindoneme por realigi niajn komunajn celojn kaj esperoble kondukos nian asocion al novaj sukcesoj.

Dankegon al la ĝisnunaj estraranoj, apatre al Anto Mlinar kaj Spomenka Ŝtimec kiuj faris grandegan laboron. Ni esperas ke ili plu kontribuos per sia sperto, energio kaj kunlaboremo. Antaŭ ni kuŝas multaj defioj, sed mi estas konvinkita, ke per unueco, inspira etoso kaj konstruktiva kunlaboro ni povas atingi multon.

IŜ

## Nia gazeto *Tempo* la temo de ekzameno en Ĉinio

En Fakultato de fremdlingvoj de la Zaozhunga Universitato studento nomata Sunlumo elektis por la temo nian gazeton Tempon. Jen li defendanta sian ekzamenan temon „Konservado de la Esperanta heredaĵo kaj konstruado de favora socia medio en la Kroata revuo Tempo.“

Krom li Esperanton studas 15 knabinoj! Ĉiuj studentoj de la unua jaro havas ankaŭ armean edukigon kaj portas soldatan uniformon.

Fotis lekciistino Alessandra Madella



## Recenzo

### Constantin Virgil Gheorghiu: *Perahim*


La litero „C“ en la nomo de la verkisto signifas Constantin. Li naskiĝis en malgranda rumana vilaĝo en 1916. En la aĝo de dudek jaroj li ekstudis filozofion kaj teologion en la universitatoj de Bukareŝto kaj Hajdelbergo. Dum la periodo de la Dua Mondmilito, inter 1942 kaj 1943 li postenis kiel diplomato de Rumanio en Kroatio. En la 1960-aj jaroj li estis ordinita pastro ĉe la Rumana Ortodoksa Eklezio *Sanktaj Arkianĝeloj* en Parizo. De 1948 li ekloĝis en Francio, kie li publikigis ĉirkaŭ kvardek verkojn.

Literaturaj historiistoj kutime dividas lian verkon en du diversaj periodoj: la rumana kaj la franca. Lia romano *Perahim* estas tradukita al Esperanto de Ionel Onet kaj eldonita de Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurĉevac en 2025.

*Perahim* estas rakonto pri morto. Ĝi komenciĝas per morto kaj finiĝas per morto. Ĝi ankaŭ estas rakonto pri amo. Ĝi estas rakonto pri venĝo. Kaj ankaŭ pri malsimetria rilato inter individuo kaj socio kaj serĉado de senco en la ŝajne sensenca mondo. La fabelo de la romano sekvas la ĉefrolulon kaj lian destinon kaj pozicion en la mondo, kiu ĉirkaŭas lin. Dum la tuta romano ripetiĝas gvidmotivoj de amo, morto kaj senco, kiuj gvidas la ĉefrolulon tra la medio kaj formas lian interrilaton kun ĝi kaj kun liaj proksimuloj.

Filozofia rolo de la destino en homa vivo estas la kerna parto de la poetiko de la romano. La vera demando, kiu aperas post la legado de la romano, estas jena: *Ĉu vere oni ne povas eskapi el la katenoj de la destino, negrave kiom oni penas?* Mi lasas al ĉiu leganto de la romano la eblecon respondi ĝin por si mem.

Filip Ivančić



## Aŭstrala-Novzelanda jarkunveno en Aŭkland



La novjaro en la suda hemisfero komenciĝas per la komunaj jarkunvenoj de la Australia Esperanto-Asocio (AEA) kaj la Nov-Zelanda Esperanto Asocio (NZEA). Ĉiun kvinan jaron la jara kongreso estas organizata en Nov Zelando. Tial, la lasta *Somera kursaro kaj kongreso* estis organizita en Aŭkland, de la 11-a ĝis 17-a de januaro 2026, en plena somero. Ekde la pandemio de koronaviruso, AEA organizas prelegojn per la reto ĉiun trian dimanĉon, ĉe ni frumatene, kaj mi ĝojas partopreni. Tiel mi rimarkis ke ĉi-jare la kongreso estis okazonta en Nov-Zelando, kaj mi decidis fari longan viziton al ambaŭ landoj.

Mi forlasis Rijekon sub la (malmulta) neĝo kaj tra Frankfurto kaj Honkongo atingis Sidnejon kun 36°C post 27 horoj de volo. De tie mi daŭrigis per kvarhora flugo al Aŭkland, kiu estis pli freŝa, kiel nia printempo. La kongresejo estis Retiriĝa Centro Sankta Francisko, tre bela modernisma konstruaĵo, konstruita en kvardekaj jaroj de la dudeka jarcento kun malgrandaj unulitaj ĉambroj kun meblo farita laŭmezure. Ĉirkaŭ 40 esperantistoj patroprenis la kongreson, la plejparte el Aŭstralio kaj Nov-Zelando, sed ankaŭ el Kanado, Japanio, Sudameriko kaj tri eŭropanoj, la franca fizikisto Joël Fontaine kun sia edzino kaj mi. Ni ambaŭ prelegis pri la lumo, sed li pri la fizika parto (*Lumo, ne nur...*), kaj mi pri la kemia (*Lumo kaj aeropoluado*). Kredu min, ni ne kunordigis la temon.

Krom la prelegoj oni havas Esperanto kursojn je tri niveloj por komencantoj (gvidanta Sandor Horvath), progresantoj (Joanne Cho) kaj spertuloj (Moises Herrera), jogon, cirklan dancon, ekskurzon al Davenport kaj fotokonkurson. Mia foto de du niaj instruistoj (Joanne kaj Moises) nomita *Kiu estas pli bona?* atingis la trian lokon. La respondo al la demando mi ne scias, ĉar ambaŭ estas tre bonaj instruistoj.

Post la kongreso mi vojaĝis tra Nov Zelando dum du semajnoj. Mi vizitis kun Sandor kaj Helen alian esperantiston Jonathan kiu loĝas en Takaka, en Golden Bay, ĉe la norda marbordo de la Suda insulo. Jonathan estas emerita kuracisto el Usono, kiu traslokiĝis en Nov-Zelando antaŭ 18 jaroj. Li lernis Esperanton mem helpe de retaj kursoj kaj ŝatas gastigi aliajn esperantistojn.

*D-ro Ana Alebić Juretić*

## Esperantistoj en la zagreba programo Nokto de la muzeo



La 31an de januaro 2026 okazis en Kroatio tradicia Nokto de la muzeo en kiu publiko senpage vizitas muzeojn ĝis la 1a horo nokte. Inter 180 muzeoj (kaj similaj institucioj) dise tra la lando aktiviĝis ankaŭ ĉi-jare Kroata Esperanto-Ligo. Niaj programoj allogis 26 homojn, inter ili pluajn neesperantistojn. En 3 eroj ni prezentis la veteranojn el la komenco de la 20-a jarcento, kaj precipe la aŭtorinon de la unua kroata Esperanta gramatiko kaj Esperanta Vortaro Danice Bedeković de Pobjenička. Ŝi estis ankaŭ la redaktorino de Kroata Esperantisto, la unua gazeto de kroataj esperantistoj. Kroata Esperanto-Ligo jam delonge klopodas pri nomumo de ŝia strato en ŝia naskiĝurbo Varaždinske Toplice kaj en 2026 la ŝancoj kreskas. Pri la veteranoj de Esperanto en Kroatio komence de la jarcento parolis Spomenka Štimec.

La Esperanta programo de Kroata Esperanto-Ligo estis unu el 900 programoj okazintaj tiunokte en la lando.

Aparta programero eŝtis dediĉita al Tibor Sekelj, pri kiu parolis Ivan Špoljarec – Štef.

Dum la vespero estis lanĉita ankaŭ 20-minuta instrufilmo pri la Zagreba Metodo, kiun filmis Branka Sacher. Pri la metodo parolas en la filmo la aŭtoroj de la lernilo Ivan Špoljarec – Štef kaj Spomenka Štimec dum Veronica el Kolumbio kaj Eric el Burundo prezentis kiel ili lernas Esperanton per la lernilo de la Zagreba Metodo.

S. Ŝ.

*Fotis Olga Štajdohar-Paden*



## Kroata verkisto Nenad Rizvanović ĉe esperantistoj

La 13an de majo 2026 gastis en Esperanto-Societo „Tibor Sekelj“ kroata verkisto Nenad Rizvanović kun sia nova romano „La celpoŝto Osijek“/“Zadnja poŝta Osijek“. Li volis verki romanon pri Osijek kaj li inspiriĝis per la aŭtobiografia verko de Lavoslav Kraus, prestiĝa osijeka esperantisto. Kraus naskiĝis en Osijek en 1897 kaj soldatservis dum la Unua mondmilito en la orienta Eŭropo. Sperto de Oktobra revolucio kaj la Hungara revolucio el 1919 forte influis lin. Profesie li estis kuracisto kun grava kariero en Osijek kaj Našice. Politike li estis konvinkita komunisto, kiu en Osijek posedis en sia biblioteko la plej grandan kolekton de „Komunisma manifesto“ en multaj lingvoj. Li estis ankaŭ en la estraro de la plej altkvalita jugoslavia hospitalo Vojna medicinska akademija. Hungara ŝtato premiis lin per la ordeno de ora grado. Li mortis en Beograd en 1984.

Por la verkisto la Esperanto-kariero de Kraus ne gravis, li mencias Esperanton nur ĉe unu aresto de Kraus. Kraus lernis Esperanton kiel 11-jara knabo. Postenis kiel prezidanto de Esperanto-Societo „Liberiga Stelo“ en Osijek kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo en Beograd.

Dum la konversacio kun la verkisto, ni malkovris interesan koincidon ke li mem parenas al la aktuala prezidanto de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Šefik Rizvanović.

S.Š.



Fotis Krunoslav Tišljar



## Gastado de esperantistoj en TV

La unua kanalo de la kroata televido havas specialan elsendon por la homoj de la tria aĝo nomata „Zlatna liga“ – „La ora ligo“. En ĝi oni prezentas homojn kiuj sukcesas forte kulture aktivi malgraŭ la aĝo.

La gastoj de la elsendo de la 2a de junio 2026 estis Spomenka Štimec kaj Božidar Brezinščak Bagola, kiuj dum 30 minuta programo havis okazon abunde paroli pri Esperanto, Al la gvidantoj de la elsendo, konataj ĵurnalistoj Božo Sušac kaj Ljiljana Saucha aparte plaĉis la rolo de Esperanto kiel lingvo-ponto por la kroata kulturo

S.Š.

## La unua premio por nia nova membro Veronica Alzate

Veronica Alzate estas juna knabino el Kolumbio kiu ekloĝis en la lando de siaj praavoj. Ŝi havas intereson pri Esperanto ĉar ŝia prapraavo estis Stanislav Tomić, grava kroata esperantisto post la Unua mondmilito. En la jaro 1919 li publikigis sian Esperantan gramatikon “Esperanto u 33 lekcije”. En la libro li uzis la prozon de pola verkistino Eliza Orzeszko, kiun esperantigis la plej granda stilisto de la esperanta literature Kazimierz Bein.

Ankaŭ la praavo de Veronica estis esperantisto Anton Tomić Mach, kiu fondis Kolumbian Esperanto-Asocion.

Veronica nun lernas Esperanton honore al siaj praavoj. Ŝi mem estas tre kreema. Ŝia profesio estas dezajno. Ankaŭ ŝia frato Esteban estas nun en Kroatio. Ankaŭ li estas dezajnisto.



La 15an de novembro 2025 okazis en Zagrebo konkurso pri la fantaziaj kostumoj el video-ludoj kaj Veronica ricevis la unuan premion. En la jaro 2025 ŝi reprezentis Kroation ĉe la simila konkurso en Sofio.

Kun siaj kolegoj Eric, Ivan Špoljarec kaj Spomenka Štimec Veronica kreis filmeton pri la Zagreba Metodo de Esperanto-instruado. En ĝi estis montrita la premiita kostumo kiun ŝi kreis.

S.Š.

## Vizito de la fotoalbumo de Emilija Lapenna el Ĉikago al Zagreb

La 2an de aprilo 2026 vizitis Kroatan Esperanto-Ligon la kroata sinjorino Irena Hindy. Nun ŝi vivas en Ĉikago. Ŝi havis peton:



antaŭ 5 jaroj ŝi vizitis Zagrebon kaj aĉetis en la pulbazaro iun fotoalbumon. Ĝi rilatis al Esperanto. Ŝi aĉetis ĉar ĝi havis belan kovrilon kaj interesajn fotojn. Montriĝis ke la fotoalbumo apartenis al Emilija Lapenna. Ĝi entenis ŝian vivon kun Ivo Lapenna el la epoko 1927-1936. Tiel ebleis vidi foto de la fondiĝo de Akademia Esperanto-Klubo, Lapenna en Tuzla dum sia armea edukado por rezerva oficiro, esperantaj kongresojn en Slavonski Brod kaj Osijek...

Irena kun intereso fotis la titolpaĝojn de la verkoj de Emilija kaj Ivo Lapenna kaj scivole aŭskultis kiuj ili estis. Irena kun plezuro fotiĝis apud la biblioteko de Emilija Lapenna en nia ejo.

La posedanto kaj la albumo revojaĝis al Ĉikago.

*S. Ŝtimec*

*La fotojn el la albumo de Emilija Lapenna fotis Patrick Allen*



Proklama 5-godiŝnaja postojana Kluba esperantista akademiĉara 1933. u dvorani "Kolo", anđauja Akademiĉa za kazaliŝnu unjeuost.  
U srediŝni l. reda je Danica Bedekoviĉ, pionir esperantskoga pokreta u Hrvatskoj.



## Bela kritika artikolo en "Jutarnji list" pri la gastado de Andrej Korobejnikov en la koncertejoj Lisinski

Jana Haluza, prestiĝa zagreba muzikologino, verkis por la gazeto "Jutarnji list" belan artikolon pri la muzikado de la rusa pianisto Andrej Korobejnikov en la koncertejoj Vatroslav Lisinski en Zagrebo la 14an de novembro 2025. La konata usona direktisto Lawrence Foster invitis Korobejnikov por muziki el la verkoj de Mendelsohn kaj Schumann kun la Zagreba filharmonio. Kadre de la koncerto Andrej havis la okazon diskuti kun la publiko kaj li menciis kiel li kelkfoje gastis ĉe zagrebaj esperantistoj kaj koncertis en la kongresaj programoj de Kroata Esperanto-Ligo, interalie en "Vatroslav Lisinski" kaj ankaŭ en la prestiĝa zagreba koncertejo Glazbeni zavod, nun riparata post la tertremo.

*S. Ŝtimec*

*Fotis Ivan Ŝpoljarec*



## Split – printempa ekskurso

Esperantistoj el Split jam dum pluraj jaroj komune ekskursas en printempo. Ĉi jare la kunestado okazis la 24-an de aprilo en vilaĝeto Nevest, proksime de Drniŝ. Dudeko da membroj de Esperanto-Societo „Split“ en agrabla etoso pasigis la tutan postagmezon ĝuante en babilado, diskuto, sporto kaj en la abunda kaj bongusta manĝo.

La ĉeestantoj donace ricevis la ĵus aperitan libron de Danica Bartulović kaj Lidija Leskur „Vjesnice ljubavi / Mesaĝistinoj de amo“ kiun kuneldonis DEC Đurđevac kaj ES „Split“.

*IŠ*

*Fotis Ivan Ŝpoljarec*



**Srdan Sacher**

**:anaso flugas super la lago Jaruno:**

malalte  
preskaŭ, sed neniam tuŝante  
la surfacon de la akvo

se mi estus en Japanio  
aŭ en Ĉinio  
la birdo estus gruo  
kaj lago havus iun nomon el libroj pri zeno  
mistera kaj famkonata

kaj ĉiuj sekvantoj de la vojo  
el tiu ĉi rakonto  
sentus plezuron de komprenado  
en siaj stomakoj  
kaj frapus per lignaj kuleroj siajn lignajn  
manĝbovlojn  
aprobante

tiamaniere, verŝajne ĉi tiu poemo  
restos nerimarkita

*Tradukis Branka Sacher*



*Fotoj: Ivan Špoljarec*



**Zora Heide**

**KANTO EL LONTANO**

Mia koro havas kvar ventriklojn,  
la plej granda estas la kroata:  
tintas, tremas orspikoj vilaĝaj  
kaj branĉaro el Zagreb' amata.

Mia koro havas kvar ventriklojn,  
la plej granda estas Kroatia:  
bergrapoloj kaj Zagorje blua  
lulil' patra ĝojfajre radia.

Mia koro amas la naturon  
kiu flegas la lilion puran,  
mia koro migranto ja diras,  
ne forgesu la maron lazuran.

Mia koro amas Esperanton  
Medvedgradon kaj ĝian persiston,  
mia koro migranto ja diras,  
la fidelan honoru rajdiston.

La ventriklo ne premu la koron!  
Jes, la plej granda nun flugu vi for  
al l' altaro de nasklando nia,  
ho, dolĉa revo, kara rememor'!

Bondezirojn el l' mondo alvoku  
al Unua kongres kroata,  
la glor' praa de l' patrujo floru  
kaj la ĝojo en brakumo frata!

Ĉe Unua Kongres' Kroatia,  
flamantan torĉon levu alter sor,  
festu l' tagojn de l' rikolto brila,  
pri la verda stelo kantante en ĥor'!

Mia koro havas kvar ventriklojn,  
la plej granda estas la kroata:  
ĝermas, flagras vilaĝaj herbejoj  
kaj verdajoj el urbo amata.

-----  
*Tiun poemon la poetino Zora Heide sendis el Rejkjaviko,  
kie ŝi tiam vivis, salute al la Unua kongreso de kroataj  
esperantistoj en 1997.*

# Nekrologoj

## IVO OSIBOV

(1937–2026)

En Split mortis la 10an de junio 2026 brila parolanto de Esperanto Ivo Osibov. Li naskiĝis en Kaštel Štafilić la 1an de februaro 1937 kaj diplomiĝis pri juro en Universitato en Zagreb 1960. Li tie magistriĝis pri la komerca juro en 1985.

Li estis la ĉefo de jura sekcio de la komerca entrepreno Jugosplastika en Split de 1963–1972. De 1972 li instruis en Jura fakultato de Split kiel asistanto kaj supera lekciiisto. Li esperantistiĝis kiel gimnaziano en 1952. Gvidis multajn kursojn en Esperanto-Societo Split, Esperanto-Societo „Bude Borjan“ kaj Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb, kies kunfondinto kaj la unua sekretario li estis. Komitatano kaj sekretario de Kroata Esperanto-Ligo, komitatano de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de la iama Jugoslavia Esperanto-Ligo. Estrarano de Tutmonda Junulara Asocio – TEJO en 1959. Inter la 1964 kaj la 1968 prezidanto de TEJO. Ofte gastprelegis en eksterlando. En UK Zagreb estis elektita C komitatano kaj ĝenerala sekretario de Universala Esperanto-Asocio. Li fidelis al Esperanto ĝis la lasta vivojaro. Lia tombo estas en la tombejo Lovrinac en Split.



*S. Štimec*



*Ivo Osibov, 2017 (supre).*

*Ivo Osibov parolas dum la UK en Zagreb, 2001 (sube).*

*Fotis Ivan Špoljarec*

## PROBAL DASGUPTA

(1953–2026)

Lunde, la 1-an de junio 2026 nin subite forlasis Probal Dasgupta. La novaĵo pri lia morto trafis la Esperantujon, kies aktiva membro li estis ĝis sia morto. La barata lingvisto kaj esperantisto Probal Dasgupta naskiĝis la 19-an de septembro 1953 en Kolkato en la familio de intelektuloj. Ambaŭ liaj gepatroj estis universitataj instruistoj. La plenkreskado en intelekta medio estis stimulantanta por Dasgupta, kiu frue montris intereson por lingvoj. En la aĝo de dekok jaroj li publikigis sian unuan sciencajn artikolon pri fonologio. Li studis lingvistikon en la Universitato de Kolkato, kaj doktoriĝis en 1980 en la Universitato de Novjorko per disertacio pri sintakso. La kampoj de lia scienca intereso estis sintakso, fonologio, sociolingvistiko kaj lingvopolitiko.



Esperanton li lernis en 1967 en la aĝo de dekkvar jaroj. Jam en la sekva jaro li aliĝis al Hinda Instituto de Esperanto kaj al UEA. Ekde la komenco li aktive laboris pri la promocio de Esperanto, li organizis kursojn kaj prelegojn en multaj landoj kaj estis reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. De 1980 ĝis 1983 li volontulis en Centra Oficejo de UEA, kaj poste li fariĝis membro de Akademio de Esperanto, kiun li prezidis ekde 2016. Ekde 2007 li estis kunredaktoro de literatura revuo *Beletra Almanako*. Dum du mandatoj li estis estrarano de UEA, kaj ekde 2007 ĝis 2013 li okupis la postenon de ties prezidanto. Pri lia morto informis sur lia propra Facebook-paĝo lia filo kaj edzino. Li forpasis en sia dormo pro apopleksia atako.

Por la kroata kulturo li precipe gravis kiel tradukinto de „Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić“ de Ivana Brlić-Mažuranić bengalen. Li ankaŭ elektis la bengalan libron „La vivo de Damoru“ de Trailokyant Mukhopadhyay por la EU projekto, per kiu li estis tradukita de Domagoj Vidović kroaten.



*Filip Ivančić*



*Slavko Mihalić (1928-2007)*

## ALPROKSIMIĜO DE LA ŜTORMO

Rigardu tiujn nubojn Vera kial vi silentas  
Mi ja ne estas besto sed jen la pluvo  
Kiel subite malvarmiĝis  
Ni estas for de la urbo

Bone Vera neniam mi forgesos tion kion vi donacis al mi  
Ni nun estas unuo kaj kial paroli  
Flavaj nuboj kutime alportas hajlon  
Ĉio jam mutas la cikadoj kaj la greno

Se vi deziras ni povas ankaŭ resti  
Mi timas por vi por mi egalas  
Fulmobatoj danĝeras en kampoj  
Kaj ni nun estas la plej altaj (kaj tiel malbenite solaj)

Multaj kamparanoj vekrios ĉi vespere pro la grajnoj elspikitaj  
Mi ne povus konsenti ke mi tiom dependu de veterŝanĝoj  
Ne ploru Vera tio estas nur nervoj  
Ankaŭ ili antaŭsentas la ŝtormon

Mi diras al vi vivo entute pli simplas  
Jen la unua gutoj nun komencos tumultego  
Butonumu la robon vidu ankaŭ la floroj fermiĝadas  
Mi ne senkulpiĝus se io okazus al vi

Tiu ĉi loko certe restos sankta en mia memoro  
Mi petas vin pli rapide marŝu kaj ne rigardturniĝu

*Tradukis Ivan Ŝpoljarec*